


Numero: 309.
Februaro: 2018.

26-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Eterna paco

La homaro ĉiam revis pri la eterna paco. Tio ĉi estas idila sonĝo, kio neniam povos realiĝi. Kvankam estus tre bone, se sur terglobo ne tondrus kanonoj kaj el la ĉielo ne falus bomboj.

Laŭ mi ĝis du homoj vivos sur Tero, ankaŭ milito estos.

Mi scias, ĉi tiun skribi estas terure kaj nun multaj homoj diskutos kun mi.

Mi provas rigardi la mondon reale. Ankaŭ en la naturo ofte estas sunbrilo kaj fulmotondro.

Kompreneble, se nun erupcius mondmilito, tio estus katastrofa por la homaro. Eble tia milito kondukus al la pereigo de la homaro. Ni malaperus de sur la terglobo kaj denove devus pasi miloj da jaroj ĝis evoluus intelektinta vivo. Sed eble ĝi ne estos la homo. Sur Tero ekzistas multaj estaĵoj, kiuj povus plenumi tiun ĉi rolon.

Ĝis ni sukcesos eviti tutteran militon ni havas esperon, kaj dum tio ni povas revadi pri la eterna paco.

Ne pensu, ke mi vidas la mondon tro pesimisme! Mi provas pensadi reale flankenmetante falsajn ideojn, kiuj ofte trompas nin.

Ankaŭ mi tre ŝatus se sur terglobo povus esti eterna paco, kaj oni ne devus timi, eĉ timegi de nuklea milito.

Bedaŭrinde multe da tiaj armiloj estas en grandpotencaj landoj, kiuj minacas nin. Se tiuj ĉi raketoj estos ekirigitaj, nin atendas katastrofo.

Mi diris komence, kredi la eternan pacon estus bona afero, sed la homa animo estas tia, ke ĉiutage oni fabrikas novajn kaj novajn armilojn. Se ili pretiĝas, tiam oni deziras provi kaj uzi tiujn.

Preĝu al Dio, tiu tago estu tre malproksime kaj ĉiufoje estu homo, kiu prokrastos premi tiun butonon, kiu ekirigas la nuklean militon.

El tiu milito neniu lando, nacio saviĝos. Ĝi havos nur malvenkintojn. Pereiĝos ĉio, kion ĝis nun kreis la homo kaj el terglobo fariĝos dezerto.

Espereble tion ĉi neniu deziras. Do, ni revadu plu pri la eterna paco!

— Redaktanto —



Kosmolingvo

La kosmoŝipo proksimiĝis al la planedo. La pasaĝeroj jam malpacience atendis la alvenon. Ili ekiris antaŭ tri teraj jaroj. Supozeble sur tiu ĉi planedo estas inteligenta vivo. Ĝin pruvas la radiosignoj per kiuj la ĉi tieaj estaĵoj bombardas Teron.

Verdire ankoraŭ neniu scias, kiel ili aspektas. Ĉu ili similas al homo, aŭ ili estos tute aliaj.

Baldaŭ la pasaĝeroj de la kosmoŝipo ekscios. Ili ekscitite atendis la renkontiĝon. Ĝis nun ankoraŭ homaro ne renkontiĝis persone kun eksterteruloj.

Ili kunportis la plej modernajn tradukmaŝinojn por ke ili plifaciligu la komunikadon. Tiuj ĉi grandiozaj maŝinoj povas traduki ĉiujn lingvojn ekzistantajn sur la terglobo. La sciencistoj opinias, ke ili funkcios senprobleme ankaŭ sur tiu ĉi fora planedo.

Sur la ekrano ekaperis informo, ke post duonhora komenciĝos la alplandiĝo. La astronautoj prepariĝu.

En tiu situacio la minutoj rampas tre malrapide. Ili ĉiuj jam volonte promenadus sur la surfaco de la planedo kaj konatiĝus kun la lokanoj. Laŭ la radiomesaĝoj la planedanoj atendas ilin kaj la loko estas destinita, kien alvenos ilia kosmoŝipo.

Fine ili alvenis bonŝance. Ankoraŭ kelkaj lastaj kontroloj kaj malfermiĝis la pordo. Antaŭ ili tie estis la belega surfaco de la planedo.

Ĝi ege similis al tera pejzago. Oni povintu diri, ĉi planedo estas dua Tero.

La kosmoŝipo alplandiĝis sur verdan kaj floran kampon. En la malproksimo vidiĝis la konturoj de granda urbo.

Kiam ili surpaŝis la planedon ankaŭ la akceptokomitato ekaperis.

Antaŭ la ekiro la astronautoj pensis, ke alveninte ili renkontos strangajn estaĵojn, sed ili baldaŭ devis seniluziĝi, ĉar ili similis al teranoj. Eble nur ilia haŭto estis iomete stranga. Ĉar ili estis bluaj, sed same tiel aspektis kiel la tera homo.

Ili funkciigis la tradukmaŝinojn, ĉar la planedanoj salutis ilin.

— Estu salutataj, karaj gastoj! — aŭdiĝis la saluto.

En la sekva momento la gvidanto de la akceptokomitato demandis:

— Kio estas ĉi aparato?

— Tradukmaŝino — respondis la gastoj.

— Ja, vi parolas Esperanton kaj ankaŭ ni ellernis ĉi tiun lingvon. Laŭ mi en la estonto ni ne bezonos tiun ĉi tradukmaŝinon.

La astronautoj forĵetis siajn tradukmaŝinojn kaj komenciĝis senĝena babilado en Esperanto.

— Ŝaŝa —

Forfluginta kariero



Maria lernis fremdan lingvon antaŭ tridek jaroj. Ankoraŭ en la lernejo ŝi devis lerni la rusan. Tiutempe ŝi ŝatis ĉi tiun lingvon kaj onidire ŝi bonege posedis ĝin. En la lernejo ŝi ĉiam ricevis bonajn notojn el ĝi. Ŝi estis elstara lernantino kaj ŝia lingvoinstruistino aŭguris por ŝi grandan karieron. Ŝi proponis lerni la rusan kaj aliajn slavajn lingvojn en universitato. Laŭ la instruistino estus bone, se Maria daŭrigus la studadon en Sovetio. Ŝi eĉ faris la unuajn paŝojn por Maria. Ja, ŝia edzo Igor devenis el Moskvo kaj li havis bonegajn kontaktojn kun sovetaj profesoroj, kiuj certe povintus helpi al la knabino.

Maria hezitis. Ŝi ne deziris forlasi siajn gepatrojn. Tiam jam ŝia patro estis sufiĉe maljuna. Li estis preskaŭ sepdekjara.

Kvankam la gepatroj ne kontraŭis la studadon en Sovetio. Ili estis ege fieraj je sia filino kaj kuraĝigis ŝin:

— Karulino, akceptu la helpon de via lingvoinstruisto. Ŝi volas al vi bonon. Ĉiusomere vi povos hejmenveni kaj ni vidos unu la alian.

Verdire, ke Maria restis hejme kaj ŝi ne studis en Sovetio, tion kaŭzis tute alia afero.

Ŝi ekkonis junulon Ŝtefanon. Li estis simpla elektristo, kiu faris laboron en la najbaro. Ĝis tiam Maria ne vidis la viron. Li estis ok jarojn pli aĝa ol la knabino. Li jam estis vera viro, kiu revadis pri propra familio.

Komence ili nur babiladis pri bagatelaj aferoj. Ŝtefano estis ŝercema kaj bonhumora viro. Li rapide ekplaĉis al Maria.

Ankaŭ post la fino de la laboro Ŝtefano revenis al la vilaĝo kaj ofte li renkontiĝis kun la knabino. El amikeco fariĝis amo.

La lingvoinstruistino vidante la florantan kontakton provadis konvinki sian lernantinon, ŝi ne faru stultaĵon, pripensu bone la studadon en Sovetio. Tiutempe alvenis ankaŭ pozitiva apogo de la soveta profesoro, kion helpis aranĝi Igor.

Malgraŭ tio, Maria elektis elektriston kaj ankoraŭ post la rikolto de vinberoj ili geedziĝis kaj baldaŭ unu post la aliaj naskiĝis tri belegaj infanoj unu knabo kaj du knabinoj.

Poste okazis grandaj ŝanĝiĝoj en la politiko kaj la mondo transformiĝis.

Ankaŭ Soveio disfalis kaj ĝi fariĝis Rusio kaj multaj malgrandaj respublikoj.

Maria tute forgesiĝis pri la studado en universitato. Ŝi ne havis tempon por studi. La hejmaj laboroj okupis ŝin.

Komence Ŝtefano estis bona edzo, sed post kelkaj jaroj, kiam naskiĝis ankaŭ la tria infano Réka, li ofte forestis de la domo.

Li ĉiam mensogis, ke li laboras ĝis malfrua nokto. Iam en iu tago la najbarino vidis lin elveni kun ebriaj amikoj el la vilaĝa drinkejo. Kun ili estis ankaŭ fivirino.

Li provis klarigi, ke ne tio estas, kio estas videbla.

Plurfoje jam ne revenis la idilia familia vivo, kio estis antaŭe.

Maria ofte ploris kaj dum kelkaj jaroj ŝi maljuniĝis.

Dume ankaŭ la infanoj plenkreskis kaj Maria havis pli multe da tempo por revadi.

Ofte ŝi ekmemoris pri la studentjaroj kaj la eblo studi en Sovetio, kie ŝin atendis kariero. Ĉio forflugis kaj restis nur sonĝo.

En iu tago, kiam neniu estis hejme, Maria serĉis la malnovan lernolibron de la rusa.

Trafprove ŝi malfermis la libron kaj eklegis. Ŝi ankoraŭ rememoris pri ĉio. El ŝia menso malrapide elvenis la malnovaj lernohoroj, la unuaj balbutadoj en fremda lingvo kaj la laŭdaj vortoj de la lingvoinstruistino.

El la okuloj de Maria ekfluis la larmo kaj ĝi malpurigis sian tutan vangon.

— Apáti Kovács Béla —



Poezio



Marian Załucki (1920 - 1979)

Pola poeto, satiriko, verkisto.

Li kunlaboris kun radio, teatroj, kabaredoj kaj ĵurnaloj. Załucki skribis multajn

satirajn librojn por maturaj homoj kaj versaĵojn por infanoj.

Marian Załucki

Gaja Ovo

Sur la tablo kuŝas bildkartoj

Kun deziroj: "Gajan Ovon!"

Sur la mondo regas teroro, perforto,

La homaro sentas mizeron,

Kaj Ovo havu bonan humoron?

Ĉie aferoj, bandoj, friponoj,

Kaj ĝojon oni postulas de Ovo!

Mankas mono, la vivo estas aĉa,

Kaj Ovo devas esti gaja!

Laŭ laiko, tio estas normo,

Sed ĉu iu, iam sentis tion,

Kion sentas Ovo?

Anstataŭ koko esti aŭ pulardo

Ĝi devas ĝoji

Malmola sur tablo.

Ĝin devas ĝui entuziasmo

Nur pro tio,

Ke estos por vi festa plado.

Ĉu vi, anĝeloj homaj

Post kuro estos tiom ĝojaj?

Malmola Ovo!

Tragia estaĵo!

De nasko ĝi suferos

Pro psika traŭmo,

Ke neniam birdo estos.

Ovo kolera!

Ovo frustrata!

Mi vin kompatas.

De mi oni ankaŭ gajecon postulas...

Postulas aĝulo kaj junulo,

Ankaŭ por Pasko,

Simile kiel de Ovo.

Sola mi iras

Tra stratoj homplenaj

Kun malestimo.

Neniu min komprenas,

Nur Ovo

Malmola.

Tradukis Danuta Kowalska

Marian Załucki

Mi petas senarmiigon

Prezidento ne dormas

Generalo cerbumas

Kaj zorgas stabanoj,

Por ke mi, homo fremda

Mortu laŭ moderna

Kaj la plej nova

Tekniko atoma.

Por tiu celo penas

Spertuloj, fakuloj,

Sed tio min ne interesas.

Ili pri mi zorgas,

Kiel parencoj.

Obusojn perfektigas,

Bombojn fortigas,

Por ke ne trafu min

Iu malmoderna.

Por mi tio estas indiferenta.

Pli bone, la ekvivalenton de la mono

Destinitan por mia morto,

Oni donu al mi-

Tiujn kelkajn zlotojn...

Kaj mi mortos mem,

Pro troa manĝado,

Aŭ seksumado,

Sen Gajgeraj kalkuliloj,

Sen radiumaj mezuriloj.

Mi ne volas pensi pri tio.

Mi ne estas snobo,

Sed simpla laboranta homo

Gajgero pri mi ne kalkulu!

Mi veturos al UNO

Ĉar estas pacemulo,

Protestos kontraŭ armiloj,

Eĉ kontraŭ pastoruliloj.

Tradukis Danuta Kowalska



POR INFANOJ



Lamanta knabeto

Iam vivis knabeto, kies piedo estis malsana. Li lamis kaj li povis iri nur tre malrapide. Pro tio la infanoj primokis lin. Neniu volis ludi kun la knabeto. Tial li ĉiam estis sola. Kiam la infanoj ludis sur la korto de la lernejo li nur rigardis ilin malgaje.

Ofte li revadis, ke lia malsana piedo resaniĝos kaj ankaŭ li povos kuri, eĉ kuregi, kiel la aliaj knaboj.

Sed ĝi estis nur sonĝo kaj ĝi neniam realiĝis.

En iu tago nova knabino alvenis la lernejon. Ŝi estis blonda kaj longharara.

Onidire ŝi estis eminenta lernantino. Ĉefe ŝi ŝatis la matematikon.

Unue la infanoj strange rigardis ŝin. Ŝi estis fremda en la lernoklaso. Vere la instruistino prezentis ŝin al la gelernantoj, sed komence neniu volis paroli kun la nova knabino.

En la lernohora paŭzo, la infanoj kuris al la korto. Ŝi kaj la knabeto restis en la lernoĉambro.

La knabino interesiĝante rigardis al li kaj fine ŝi demandis:

— Ĉu vi ne iros al la korto?



La knabeto ruĝiĝis kaj ne sciis, kion respondi. Li timis diri, ke li havas malsanan piedon kaj li iras malrapide.

— Mia piedo doloras min — li elbŭsigis fine kaj li klinis sian kapon. Li ne kuraĝis rigardi al la knabino.

— Kio okazis al via piedo? Ĉu vi falis aŭ stumblis?

— Ne — li respondis krute.

— Eble ĝi rompiĝis. Ĉu ne?

— Ne — sekvis longa paŭzo kaj fine li diris. — Mia piedo estas denaske malsana.

— Ĉu vi estas lamanto?

— Jes.

La knabeto ege timis, se tion ĉi li elbŭsigos, la blonda knabino forlasos lin, kiel la aliaj gelernantoj. Li fermis siajn okulojn kaj kvazaŭ li jam estus aŭdanta ŝiajn malproksimiĝantajn paŝojn forrapidante el la lernoĉambro.

Kiam li malfermis la okulojn la knabino ankoraŭ estis apud li kaj ŝi ne deziris forlasi lin, eĉ ŝajnis pli amikema.



— Ne malgaju! Se vi volas, mi fariĝos via amikino. Mi ludos kun vi.

Tiu ĉi tre surprizis la knabon. Ĝis nun neniu volis fariĝi lia amiko.

Ĉu vi sincere fariĝos mia amiko? — li demandis mire. — Ja, vi scias, mi ne povas iri rapide. Mi lamas. La infanoj priridos ankaŭ vin pro mi.

La blonda knabino ekridetis kaj prenis la manon de la knabo.

— Ni iru al la korto! — ŝi diris amikece.

La knabo preskaŭ ekploris pro la ĝojo. Li ne volis kredi, ke tiu ĉi okazas al li. Eble li nur sonĝas kaj baldaŭ li vekiĝos el la belega sonĝo. Li denove demandis ĵetante timeman rigardon al sia amikino.

— Ĉu vere vi fariĝos mia amikino?

— Jes. Kредu min! En ĉio mi helpas al vi kaj ankaŭ vi al mi. Kio estas via ŝatata lernobjekto?

— La matematiko. Mi ŝatas kalkuli.

— Bonege, ĉar ankaŭ mi — ĝojegis la knabino. Ni havas komunan interesiĝon.

Nun jam ankaŭ la knabo ridetis kaj li forgesiĝis pri sia lameco. Ankoraŭ neniam li sentis tion ĉi. Nun jam ankaŭ li havas amikinon.

Ili kune kaj feliĉe ekiris al la korto.

— Onklo Adalberto —



Belaj urboj

Belaj urboj

